Stockholm 17 dec. 1945.

Al estraranoj Strönne kaj Åberg.

Ni baldaŭ havos estrarkunsidon, la 13 januaro. Bonvolu do prezenti antaŭ 31 dec. viajn novajn proponojn al tiu kunsido, por ke ni frutempe povu pretigi la tagordon.

Post nia vendreda konvenoz de FK ni ricevis detalajn informojn pri la ebleco j arangi loterion. Jam dum la kunveno ni generale priparolis la eblecojn. Jen la detaloj:
Bernhard Eriksson konas s-ron Flod (oficĉo [isto] de Koop.Förb.), kaj Flod estas amiko al notario Elmgren en Överståthållareämbetet, kiu rajtigas diversajn organizaĵojn arangi loteriojn. Bern.Eriksson instigis s-ron Flod proponi al Elmgren, ke SEF havu la rajton arangi loterion. Kaj Elmgren deklaris, ke SEF verŝajne povus ricevi tion, kondiĉe ke ni povos prezenti bonajn argumentojn kaj ke ni samtempe prezentos liston de la gajnoj.

S-ro Flod ankaŭ konas s-ron Nilsson, sindiko ĉe Vanföresanstalten (aŭ io simila). Al tiu Nilsson mi hodiaŭ telefonis, kaj ricevis la jenajn informojn:

S-ro Nilsson ĉiujare kutimas arangi loteriojn (malgrandajn) por diversaj idealistaj organizaĵoj en Stockholm. Generale oni havas 10.000 lotojn, kaj ĉiu loto kostas 50 öre. La vendado okazas sur la stratoj de Stockholm en specialaj budoj. S-ro Nilsson diras, ke ĝis nun ĉiu de li arangita loterio plensukcesis, t.e. oni finvendis ĉiujn lotojn, kaj tiam la gajno de la koncerna organizaĵo estas proks. 1.800:- kr. Tamen se estus tiel, ke oni ne sukcesus vendi ĉiujn lotojn, la risko por SEF estas kvazaŭ nula, ĉar tiam s-ro Nilsson postulos pli malgrandan % por sia helpo, kaj event. nedisdonitajn gajn-objektojn ni povos redoni al la firmaoj, de kiuj ni aĉetis ilin.

Se ni decidas arangi loterion, ni prefere faru petskribon jam dum tiu ĉi jaro, por ke nia vico ne venu tro malfrue printempe. S-ro Nilsson prizorgas ĉion: la petskribon (komprenebla en bona kontakto kun ni, kaj ni interkonsentis renkonti lin la 27 dec.), la liston de la ~~gajn~~ lotumataj objektoj kaj ĉiujn aliajn praktikajn aferojn. Ni fakte nur havos la laboron kvitenci la netosumon. En Stockholm ni opinias, ke tiu loterio enhavas tiel malgrandan riskon por SEF kaj aliflanke povus doni tiel konsiderindan gajnon, ke ni entreprenu la aferon.

Bonvolu do sendi al SEF vian respondon, ĉu vi konsentas aŭ malkonsentas, prefere antaŭ 26 dec. Samtempe vi bonvolu informi pri via plena nomo (ĉiuj antaŭnomoj), viaj adresoj (=stratadreso de Åberg!), kaj ankaŭ viaj naskiĝdatoj. Povas esti, ke ni en nia petskribo devos doni tiujn informojn pri ĉiuj estraranoj.

Samtempe mi nun sendas leteron de s-ro Fred Turner pri speciala propono. Mi sendas al Strönne, kiu poste bv sendi al Åberg, kaj li siavice al Tegelbacken.

Pardonu min, ni ja kutimas skribi svedlingve, sed mi fakte tute senpripense skribis esperante.

Salutojn kaj bondezirojn por la festotagoj!

E. Malmgren

S-ino Alemo estas
pri via alveno
Bonvenon!